

BONA ESPERO

REVUO DE
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1985/22
NUMERO: 3

ISSN 0006-7024

KIOM KAJ KION
VI FARAS POR LA
JUBILEA 1987 ?
VIDU SUR PAĜOJN

4 6 18 24 26

1985

1987
?

1986



BONA ESPERO

Revuo de la Sudaŝrika Esperanto-Asocio [SEA]

Redaktoro: S-ro Cobus Zeelie
Subredaktorino: S-ino Adèle Fouché

Redakcia Adreso: Posbus 12271, Centrahil, Port Elizabeth, 6006 Suid-
Afrika / South Africa / Sudaŝriko

Kunlaborantoj: S-ro S de Waal Natalo
S-ro F M Woolf Okcidenta Kablando
S-ro S-ino A K Fouché Orienta Kablando
S-ro J de Klerk Okcidenta Transvalo
S-ro H W Appel Orienta Transvalo
Vakantaĵo Oranĝa Liberŝtato
S-ro Z Boglani Svaŝilando
S-ro J Hammes Universitatoj

Kontribuajtoj: Oni sendu al la Redaktoro aŭ Kunlaboranto en sia
landparto. Kontribuajtoj plivole estu maŝinskribi-
taj. Manuskriptoj nepublikigitaj neresendiĝos.
Nek la Redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo
de anoncoj kaj promesoj faritaj en ili.

Prezo: Membroj de SEA ricevas la revuon senpage. Nememb-
roj abonu pere de la SEA Kasisto, P O Box 1227,
Cape Town, 8000 South Africa / Sudaŝriko

Estraro de SEA: Prezidanto - S-ro E de Kock
Vicprezidanto - S-ro A von Blottnitz
Sekretario - S-ro O Sher
Kasisto - S-ro C S Beckford
Komitatanoj - S-ro H W Appel
S-ino A K Fouché
S-ro J Hammes
D-ro J van D Strydom
S-ro F M Woolf
S-ro J J Zeelie

Adreso de SEA: La Sekretario, Sudaŝrika Esperanto-Asocio,
Bronkhorststraat 75, Groenkloof, Pretoria,
0181 Suid-Afrika / South Africa / Sudaŝriko

ĈEFARTIKOLO

Originale de Baldur Ragnarsson

1

ARTIKOLOJ KAJ RAKONTOJ

PEKanoj kunvenas surŝipe kaj oficiala teknikona kurso realiĝas

3

Rilate la multekostajn UEA kongresojn

5

Entrepreneo Afriko

6

Judaj Festoj (O Sher)

8

Grupo ĉe la Pretoria Universitato

9

Ĉu estas estaĵoj sur aliaj planedoj?

9

Enketo

14

SEA Ekzamenoj

14

La tago poste, ĉu evitebla? (A Wandel)

15

La vivo sen amo ne estas..... (A von Blottnitz)

16

Esperanto en doktoriĝa disertacio

16

Kelkaj statistikoj pri fumado

17

Kio pri la disvastigo inter sudafrikaj nigruloj?

18

(H van Loggerenberg)

Preseraro?

21

RUBRIKOJ

Ridetu

11

Trilingva artikolo

12

El nia poezio (Mi vidis ŝipon - L N M Newell)

17

Pensetoj el l'vivo

18

Venteraĵoj (E S Venter)

20

El la scienco

21

Libroj

22

L'inkpoto (Por korespondemuloj)

23

ANONCOJ

24

ĈEFARTIKOLO

Tri stadioj estas distingeblaj dum la disvolviĝo de ĉiu literaturo, ankaŭ de la Esperanta: stadio de preparo, stadio de solidariĝo kaj stadio de analizo.

La unuan stadion ĉefe karakterizas la emocieco. Ĉiuj niaj pioniraj poetoj al ĝi apartenas: Zamenhof, Devjatnin, Kofman k.a. Ĉar la karaktero de nia lingvo ankoraŭ estas esence emocieca, la larĝa fluo de niaj verkistoj ĝis nun ricevas sian koloron grandparte el tiu emocifonto. Kaj ĉar la emocio estas la ĉefa faktoro, kiu blovas vivon en artverkon, niaj poezio kaj literaturo entute devas aparteni al la plej vivipovaj en la mondo.

Dum la dua stadio certa ekvilibro inter emocio kaj intelekto aŭ formo establiĝas. Multaj niaj plej bonaj poetoj kaj verkistoj ĉi tie hejmas, i.a. Kalocsay, la plej genia poeto en Esperanto ĝis nun. Ĉi-apartenajn verkistojn pleje distingas majstreco de lingvo kaj subtila sento pri harmonio.

La trian stadion la Esperanto-literaturo eniris, miaopinie, per la epokfara poenciklo La Infana Raso de William Auld. Ĉi tie la intelekto bridas la emocion per senindulgaj analizoj, kiuj ofte trovas sian esprimrimedon en esoteraj simboloj kaj aludoj nebulecaj pro ekstrema kompakto.

Ke nia literaturo jam eniris la trian stadion, neniel signifas, ke tiu ĉi baldaŭ fariĝos ties ĉefa fadeno; la emocia valoro de nia Movado - kiu siavice estas socio el kiu devas kreski niaj poetoj kaj aliaj verkistoj - daŭre ekipos niajn talentulojn per la pulsanta naiveco tiel karakteriza por ĉia fervora preparado. Oni devas ankaŭ konsideri, ke la penado de nia literaturo respeguli en daŭro de kelkaj jardekoj evoluon, kiu daŭris multajn jarcentojn en la naciaj lingvoj, inklinas disflui en senforman kaoson kaj bezonas des pli severan disciplinon por strukturiĝi. Tamen mi ne hezitas aserti, ke la tri menciitaj evolustadioj, paralelaj al tiuj en nacilingvaj literaturoj, estas jam distingeblaj ankaŭ en la Esperanta. Temas ankoraŭ pri kruda komparo, kiu disfiniĝas ĉiam pli kun la kresko de nia literaturo. La novaj literaturistoj ĉiam pli edukigas en la propra medio de nia kulturo paralele kun ties stabiliĝado. Kompreneble tio ne devas signifi, ke tia enmergiĝo en la kolektivon minacas la individuecon.

La forta, kultura subfluo reprezentas la koncernan epokon, kaj perfekta harmonio inter la karakter-disvolviĝo de artisto kaj tiu de lia epoko estas la plej ideala kondiĉo por granda, individua arto. Ni ankaŭ devas memori, ke en ĉiu periodo kaj kampo de civilizo iuj individuoj estas de la esence emocia tipo, aliaj de la intelekta, ankoraŭ aliaj ekvilibre feliĉumas aŭ oscile nervozumas inter tiuj du. Estu kiel ajn, la neevitebla fluo de la evoluo ne devas sieĝi la individuecon de artkreatoj por ĝin venki kaj diserigi - male ĝi devas levi kaj plifortigi la apartajn distingeojn de la artistoj.

La evoluo de la Esperanto-literaturo estas laŭ la normala direkto, ke infano estas emocia, sed kreskante ĝi intellekte maturiĝas. Tio ĝenerale ankaŭ validas por la artisma evoluo de poeto aŭ pentristo, Tamen faktas, ke ĉian arton kiel ankaŭ ĉian socian fenomenon, kies plej elstara karakterero fariĝis la intelekto, minacas lamorta danĝero fariĝi malplena formo sen ia interna vivo, kaj la sola savmaniero estas revekigo de la emociaj fortoj, sufiĉe potencaj por startigi denove la tri-stadian vicon de disvolviĝo. Ke nia literaturo iam atingos tiun krizan punkton estas ekster dubo: mi ekzemple tre scivolas vidi tiun verkon de William Auld, kiu sekvas post La Infana Raso.

Baldur Ragnarsson, Islando

[Antaŭparolo originale verkita por poemaro de Edwin de Kock
Daŭrigota en la venonta numero]

Knabo 1: Ĉu vere la kameloj povas labori dum tuta semajno sen trinkiĉo?

Knabo 2: Certe! Kaj kontraŭe mia patro povas trinki dum tuta semajno sen laborado!

Sepjara Paŭlo: Paĉjo, en ĉi tiu nia mondo ne ekzistas justeco!

Patro: Kial, do?

Paŭlo: Nu vidu, la instruisto ricevas salajron kaj ni devas fari la laboron.

PEKanoj KUNVENAS SURŜIPE KAJ OFICIALA TEKNIKONA KURSO REALIĜAS

Membroj de la Portelizabeta Esperanto-Klubo kunvenis, unuafoje sur japana ŝipo, antaŭnelonge. Ĉefenĝiniero Kawai, kiu vizitis PEK antaŭ kelkaj semajnoj (vidu BE/1984/22/2) invitis la PEKanojn kunveni surŝipe kun li en la Portelizabeta haveno. Post multaj fotoj (faritaj de kaj la membroj kaj la novaĵmedioj) kaj bonaj originale japanaj biero kaj manĝaĵo, ni ĝuplene interdiskutis multon. La kunveno daŭris plenajn tri horojn! Inter la fotoj kaj manĝado la ĵurnalistoj intervjuis la membrojn de la klubo. Fine de tre laŭdinda kunveno, la Sekretariino de la klubo donacis al s-ro Kawai du librojn, unu pri Sudafriko kaj la alian pri La Amika Urbo Portelizabeto. Ambaŭ la libroj estas el altgrada glospapero.

Iu artikolo kiu aperis en afrikansa novaĵa ĵurnalo igis la lokan Teknikonon komenci oficialan kurson partotempe dum la vesperoj. La kurso planata por la periodo septembro 1985 ĝis junio 1986 jam estas akceptita de la Teknikonaj ĉefoj de la lingva fako. La rektoro ankaŭ jam montris la verdan lumon. Je la tempo kiam ĉi tiu artikolo estas skribata, oni ankoraŭ ne anoncis la kurson, sed jam decidis aperigi anoncojn pri la kurso en du afrikansaj kaj du anglalingvaj ĵurnaloj. Anoncoj aŭdiĝos ankaŭ radie (loka servo). Pluaj artikoloj aperos en kvar lokaj ĵurnaloj.

大阪商船三井船舶株式会社
機関長
川合隆史

本社
〒100 東京都港区虎ノ門二丁目一番一
電話東京(584)五一一一(大代表)

La kurso estas planata por la 4-a de septembro. Post la kurso kiu daŭros entute 30 monatojn (90 minutojn ĉiumerkrede)

Ĉiu studento devas sukcese trapasi dupartan ekzamenon por akiri oficialan Teknikonan atestilon: trihoran skriban parton kaj dek-kvinminutan buŝan parton. La tuta afero estis/estas/estos bone reklamata kaj PEK esperas, ke sufiĉaj personoj registros por la kurso. Se PEK sukcesas pri ĉi tiu stimula entrepreno, la kurso fariĝos regula. Eble aliaj akademiaj institutoj kiel niaj universitatoj faros same en la kazo de stimulita intereso?

Intertempe la Portelizabeta municipalo jam promesis fari sian eb-lon nomi straton en la urbo favore al aŭ Esperanto aŭ Zamenhof okaze de la jubilea festo en 1987. Nepetite, la urba oficisto

de tempo al tempo kontaktas la klubon por informi la prezidanton pri sia progreso ĉi-rilate. Bona signo! La klubo petas ĉiujn Esperantistojn skribi (anglalingve aŭ afrikanslingve) al la urba oficisto por pli interesigi lin pri la stratnomo: The City Clerk, P O Box 116, Port Elizabeth.

Pli da informo pri la ĉi-supraj aferoj aperos en venontaj numeroj de *BONA ESPERO*.

T. KAWAI
CHIEF ENGINEER

MITSUI O.S.K. LINES, LTD.

1-1, TORANOMON 2-CHOME,
MINATO-KU, TOKYO,
105 JAPAN

TELEPHONE
TOKYO (584) 5 1 1 1

RILATE LA MULTEKOSTAJN UEA KONGRESOJN

Sudaŝrika Esperantisto antaŭnelonge plendis al UEA pri la jenaj:

1. Informo pri loĝado en la kongresa urbo temas nur pri multekostaj hoteloj kaj malofte pri malmultekostaj loĝejoj.
2. Aranĝante la kongresajn hotelojn, oni ne pripensas tiujn personojn, kiuj devas veturi de malproksime je grandaj vojaĝkostoj.
3. La ĉefa kaj plej findinda informo pri kongresaj aranĝoj kaj pri la kongresa urbo ĝenerale aperas en la dua bul-teno, kiun ricevas nur personoj kiuj jam registris por la UK.
4. Kial ne aranĝi por tiuj, kiuj estas interesataj pri pli malmultekostaj ejoj restadon en 'amasloĝejo' eĉ se necesas por tia restado dormosakoj. Komunaj loĝejoj ankaŭ taŭgas.
5. Kiam helpon donos UEA en kazoj kiam vizitoj estos rifuzataj al sudaŝrikanoj? Ĉu vere landoj kiel Ĉinio (Pekina UK) senescepte donos enirvizitojn al sudaŝrikaj Esperantistoj? Kiam Kopenhago rifuzis enirrajton al sudaŝrikaj kuracistoj antaŭnelonge, la organizantoj tuj deklaris, ke ili kongresos en alia lando. Oni do ĝustatempe havis fidindajn faktojn. Kion farus UEA pri tia situacio?

Se vi havas similajn problemojn aŭ aliajn nemenciitajn ĉi-supre, ne hezitu informi nin pri tio!

*** ESPERANTO *
SHORT COURSE AT *
PORT ELIZABETH TECHNIKON**

What: Part-time course — The international language Esperanto

Where: Language Department, Port Elizabeth Technikon

When: September 4, 1985 — June 1986
(Wednesday evenings, 19h00 — 20h30)

Fees: R53 on registration and R25 in January 1986 (notes included)

Registration: Closing date — August 30, 1985

Enquiries: Mr Cobus Zeelie, telephone 533121 extension 273 or 269 (office hours) or 711028 (after hours)

Mastrino: Kiel povas okazi ke ĉiuloje, kiam mi envenas la ĉambron, mi trovas vin senokupa?

Servistino: Kulpas viaj pantofloj! Oni ne aŭdas vin veni.

Petro: Ĉu vi vere kredas, ke vendreda edziĝo kaŭzas mal-feliĉon?

Johano: Komprenoble! Kial vi atendas, ke vendredo faru es-cepton de la regulo?

ENTREPRENO AFRIKO

La anonco kiu aperis pri nia plano sendi antistoj en afrikaj la Redakcio sendi librojn al samideanpartoj de la afrika adresoj de tiuj perbezonas librojn sentoro Hans Bakker kiu entreprenon. Ĉi-sube donacintoj. Se via vidiĝas en la listo du libron aŭ eble eĉcia adreso. Afriko bezonas vin! Bonvolu ne sendi monon.



en BE/1984/22/2 librojn al Esperlandoj ebligis al ne malpli ol 43 oĵ en diversaj kontinento. La sonoj kiuj urĝe dis al la Redakĉefas la tutan aperas listo de nomo ankoraŭ ne senprokraste senpli al la Redak-

Henk de Jong (Pieter Maritzburg) - unuopaj revuoj = 16, legolibroj = 18 kaj lernolibroj = 1.

Cobus Zeelie (Portelizabeto) - vortareto = 1, lernolibroj = 7, legolibroj = 16.

Aliaj Esperantistoj jam promesis sendi librojn kaj ĝisnune la sumo estas: Vortaroj.....1

Legolibroj....34 43 libroj

Lernolibroj...8

Revuoj.....16

La Redakcio bonvole petas, ke vi ne sendu unuopajn revuojn sed se eble kompletajn binditajn jarkolektojn. UEA jam sendas revuojn al diversaj kluboj en Afriko.

La ĉi-suprajn librojn la Redakcio sendis al Esperantistoj en Togo, Bénin, Algeria, Rwanda, Nigeria, Côte d'Ivoire, Ghana, Tanzania kaj Congo, entute 12 personoj.

De s-ro de Jong: Undino (O Schreiner), Romano pri afrika bieno (O Schreiner), 50 Jaroj kun Paul Nylén (J Ströme), La vojo x 2 jarkolektoj, La faraono x 3 (B Prus), Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj (W vd Hulst), La perfido (A de Jong), Taglaboristoj (H Kirk), Judoj sen mono (M Gold), La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj (H Sienckiewicz), La Sankta Biblio, La En la okcidento nenio nova (E Remarque), Fundamenta krestomatia, Zinnoo Sjootoo Ki (K Nohara), La vojoj estas nekonataj (L Kassák), Nia mondo - lernolibro por infanoj (A Rebers)

De s-ro Cobus Zeelie: Esperanto - a new approach (W Auld), Linguaphone rapid Esperanto course (Linguaphone Institution), The Esperanto Teacher (M Stuttard), Privilegia vojo (V Setälä), A school Esperanto course (A Batt), Unua lernolibro de Esperanto, Du malsanoj en Esperanto (A de Hoog), English-Esperanto Vocabulary (BEA), Pensoj de Zamenhof (SEA), Amuzo per scienco (C Viviani), Japanaj fabeloj (T Mikami), L Z Zamenhof - Inventor of Esperanto en bildoj (J Hornby), Rakontoj pri fantomspitantoj (ĈEL), La junaj trezor-serĉantoj (J Sullivan), Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj (S Zweig), Elektitaj noveloj (I Turgenev), Tri noveloj (A Puŝkin), Legendoj (A Niemojewski), La necenzurita humoro (H Maschler), Italaj rakontoj (E de Amicis), Nuntempaj rakontoj (Stamajov), Zamenhofa legolibro (M Kidosaki), La junaj detektivoj (J Sullivan), Karlo (E Privat).

De Hannes van Loggerenberg: RIO donaco por disvastigi Esperanton inter nigruloj en Sudafriko - vidu leteron sur p. 18.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO
De 64 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librecozoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontigoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, ŝak-problemoj, krucovertenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,65 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

JUDAJ FESTOJ

La 85-09-16an estas Roŝ Haŝana, Novjaro de la Judoj. Kiel ĉiuj el iliaj festoj ĝi jam komenenciĝas la antaŭan vesperon. Roŝ Haŝana estas la komenciĝo de la Dek Tagoj de Pento, dum kiuj ili preĝas al Dio, ke Li pardonu al ili ties pekojn. Se ili malbone traktis iun, jen la tempo akiri ties pardonon. Kiel simbolo de la dolĉa jaro al kiu ili sopiras la vespermanĝo komenciĝas per pomo trempita en mielo. Evitenda manĝaĵo estas nuksoj. La hebrea vorto por nukso estas *egoz* kaj por peko estas *ĥet*. La numeralo vorto de ambaŭ estas 17 kaj ili ne volas manĝi pekojn!

La Dek Tagoj de Pento finiĝas per la tre solena fastotago *Tom Kipur*. La judoj fastas - nek manĝas nek trinkas - dum tuta diurno. La antaŭan vesperon kaj preskaŭ la tutan tagon ili pasigas preĝante en la sinagogo.

Kvin tagojn post *Tom Kipur* venas *Sukot*. Ĝi estas unu el la tri pilgrimfestoj dum kiuj oni iris al Jerusalemo. La festo daŭras ok tagojn. Labori estas malpermesate dum la unuaj du kaj lastaj du tagoj. Dum la festo ili manĝas kaj eĉ dormas en budoj kies tegmentoj estas el laŭbo tra kiu videblas la steloj. La celo estas por memori al ni pri la vagado de la israelidoj tra la dezerto. Hebreo oni nomas la budojn *Sukot* - de tie la nomo de la festo.

La lasta tago de *Sukot* nomiĝas *Simĥat Tora*, ĝojo de Tora. En tiu tago ni finas legi el la Tora kaj ree komencas la jaran ciklon. Tora estas la Pentateŭko, la unuaj kvin libroj de la Biblio, skribitaj sur pergamentrulaĵo. Ĉiun sabaton ni legas parton el ĝi por tiumaniere tralegi la tuton dum unu jaro. Oni *Simĥat Tora* sep fojojn rondiras en la sinagogo portante ĉiujn ekzemplerojn de la Tora. La infanoj ricevas paperflagojn kaj ankaŭ partoprenas la procesion portante flagojn. Post la Diservo la infanoj ricevas dolĉaĵojn.

Oskaro Sher

GRUPO ĈE LA PRETORIA UNIVERSITATO

Artikoloj verkitaj de s-ro Hammes kaj temante pri Esperanto aperis antaŭnelonge en *Perdeby* (85 05 24), ĵurnalo de la Pretoria Universitato, kaj en *Kampus* (85 05 10), tutlanda studenta ĵurnalo.

ĈU ESTAS ESTAĴOJ SUR ALIAJ PLANEDOJ?

Kiom da scienca pruvo ekzistas pri estaĵoj sur aliaj planedoj? Neniom! Tamen ankoraŭ neniu pruvis, ke ne ekzistas estaĵoj sur aliaj planedoj!

Tute eble ne vivas iu aŭ io sur aliaj planedoj. Aŭ eble la stelaro svarmas je aliplanedaj civilizacioj. La simpla vero estas, ke oni ĝis nun ne starigis ian pruvon de ilia ekzisto. Sed, ni povas fari provajn konjektojn per la informo akirita de niaj astronomoj.

Estu N la nombro de teknikologiaj aliplanedaj socioj en nia stelaro - t.e. tiaj, kiaj kapablas konstrui spacveturulojn. N oni kalkulas per kelkaj faktoroj. Ni konsideru ilin laŭorde.

En nia stelaro -

1. La rapideco de stelformiĝo je la nuna momento estas ĉ. po unu ĉiujare = R .
2. La frakcio de steloj kun planedoj estas ĉ. $5 \times 10^{10} = F$.
3. La nombro de surloĝeblaj planedoj estas ĉ. $5 \times 10^{10} = S$.
4. Se ni akceptas Teron kiel la solan, la frakcio de loĝataj planedoj estas $1 = L$.
5. La frakcio de loĝataj planedoj kiuj montras inteligentecon estas ĉ. $1/10 = I$.
6. La frakcio de teknikologiaj civilizacioj estas ĉ. $1/10 = T$.
7. La vivodaŭro de tiuj teknikologiaj civilizacioj estas ĉ. 100-jara = V .


Do -

$$N = R \times F \times S \times L \times I \times T \times V$$


$$= \text{ĉirkaŭ duonmiliono (500 000)}$$

Se tiuj civilizacioj troviĝas egale dissemitaj tra la universo, la plej probabla distanco al la plej proksima socio tia estas ĉirkaŭ 100-lumjara. La distanco travojaĝita de lumo dum unu jaro estante 9 385 113 600 000 kilometroj, Terano devus veturi dum 100 jaroj tra distanco de ĉirkaŭ 900 385 113 600 000 kilometroj por atingi la plej proksiman planedon portantan inteligentajn loĝantojn. Aldone, oni devus vojaĝi per la rapideco de lumo!

* * *



Atendante viajn kontribuaĵojn, informon por la planata Memorlibro, kaj tiel plu estas via kara Redaktoro.....



"Ankaŭ vi tiel rapide flugus se via vosto estus brulanta"



"Kial tiel kolera? Ĉu mi ne promesis resti hejme hodiaŭ vesperon?"



"Ĉu sufiĉe apud la pilko?"



"Mi ne plu bezonas vin. Mi malrapide sed certe ja alkutimigis mem kuiru....."

AFR-ESP-ENG

TRILINGVA ARTIKOLO

ESPERANTO: Riĉa sudafricanino, vizitinte sian amikinon en najbara lando, telefonis al sia intendanto, ke ŝi hejmenvenos kaj ke li renkontu ŝin ĉe la flughaveno.

haveno.

"Nu" ŝi demandis post alveno "ĉu io nova okazis sur la domego?"

- Ne, sinjorino, nenio....Ho jes, via hundeto Fifi mortis.....

"Kio?! Fifi mortis? Sed, pro ĉielo, de kio?"

- Ĝi forbrulis dum la fajro ĉe la ĉevalstaloj.

"Kio?! Fajro ĉe la ĉevalstaloj? Kaj la ĉevaloj?"

- La ĉevaloj ankaŭ forbrulis, same la aŭtomobiloj.

"Sed kiel okazis tiu brulo de la staloj?"

- Estis pro fajrero fluganta de la domego.

"Kio?! La domego ankaŭ brulis?"

- Jes, sinjorino.

"Kaj kio kaŭzis ĉion tion?"

- La kandeloj, kiuj estis lumigitaj ĉirkaŭ la ĉerko de la mastro.

"Kio?! Mia edzo ankaŭ ? ? ?"

- Jes, sinjorino. Li mortigis sin sciiginte, ke lia bankisto ĉesis pagi, kaj ke li do perdos ĉiujn siajn havaĵojn.....

AFRIKAANS: n Welgestelde Suid-Afrikaanse dame, na n besoek aan haar vriendin in n buurland, het haar hoofopsiener geskakel om te sê dat sy huis toe kom en dat hy haar op die lughawe moet ontmoet.

"Wel" het sy na aankoms gevra "het iets nuut gebeur in die herehuis?"

- Nee, mevrou, niks nie....O ja, u hondjie Fifi is dood....

"Wat?! Fifi is dood? Maar, in hemelsnaam, waarvan?"

- Hy het uitgebrand in die vuur by die perdestalle.

"Wat?! n Vuur by die perdestalle? En die perde?"

- Die perde het ook uitgebrand, netsoos die motors.

"Maar hoe het daardie vuur by die stalle gebeur?"

- Dit was as gevolg van n vlieënde vonk vanaf die herehuis.

"Wat?! Die herehuis het ook gebrand?"

- Ja, mevrou.

"En wat het dit alles veroorsaak?"

- Die kerse wat om die meester se kis aan die brand gestek is.

"Wat?! My man ook? ? ? ?"

- Ja, mevrou. Hy het homself dood gemaak, wetende dat sy bankbestuurder opgehou het om hom te betaal, en dat hy dus al sy besittings sou verloor.

ENGLISH: A wealthy South African lady, having visited her friend in a neighbouring country, telephoned her chief caretaker to say that she will be returning home and that he should meet her at the airport.

"Well" she asked on arrival "did anything new happen at the mansion?"

- No, madam, nothing.....Oh yes, your little dog Fifi died.....

"What?! Fifi died? But, in heaven's name, of what?"

- It burnt out during a fire at the horse stables.

"What?! A fire at the horse stables? And the horses?"

- The horses burnt out too, like the cars.

"But how did that fire at the stables happen?"

- It was because of a flying spark from the mansion.

"What?! The mansion also burned?"

- Yes, madam.

"And what caused all this?"

- The candles which were lit around the master's coffin.

"What?! My husband too? ? ? ?"

- Yes, madam. He killed himself having learnt that his banker stopped payment, and that he would therefore lose all his belongings.....

- Karlo, kion faras ĝentila bonedukita knabo, se li sidas en aŭtobuso, ĉiuj sidlokoj estas okupitaj kaj maljuna sinjorino eniras la aŭtobuson?

- Li fermas la okulojn kaj ŝajnigas dormanton!

+++++

ENKETO

Esplorgrupo pri socia psikologio dezirus ekscii kiel hodiaŭaj junuloj (16-30 jaraj) de la mondo prezentas al si sian socion kaj kiel ili vidas la sociajn rilatojn. ACRE (*Accueil, Consultation, Recherche* - Akceptado, Konsultado, Esploro) de Francio deziras, ke la Esperantista junularo ensendu sian respondaron tial, ke ĝi estas tutmonda kaj diversa. Samtempe la Esperantistoj estas specifaj.

En ĉiu medio kelkaj individuoj estas rimarkataj, distingataj (oni admiras iufoje, timas aliffoje, envidas, kompatas, malestimas k.t.p.). Iuj distingas individuojn ĉie sammaniere kaj aliaj observas malsame, depende de tio ĉu ili estas en sia laborloko, kun sia familio, sportante aŭ babilante kun amikoj:

- 1] Kiajn individuojn vi rimarkas?
- 2] Kio en ĉi tiu rimarko dependas de la medio?
- 3] Ĉu (se 'jes', kial) la epoko influas la reagon de la homoj?
- 4] Ĉu la junuloj sekvas la maljunulojn aŭ kondutas alimaniere?
- 5] Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas diferencaj?
- 6] Ĉu ekzistas 'esperantistaj' agmanieroj, aŭ ĉu la Esperantistoj reagis kiel aliaj anoj de la medio?

Bonvolu vian sekson, aĝon, profesion, loĝlandon kaj kiel vi eksciis pri la ĉi-supro: ACRE, 292 Bd des Bressons, F-13300 Salon de Provence, Francio. ACRE certigas diskretan uzon de la respondoj.

SEA EKZAMENOJ

Sudafrika Esperanto-Asocio organizis siajn proprajn ekzamenojn pri Esperanto. La elementa kaj mezgrada ekzameno okazos 1986 01 11 ĉe Schmerenbeck Centro (Instituto por speciale dotitaj infanoj), 3 Trematon Place, Parktown 2193 (telefono 642-9026). Se vi deziras akiri la novan glosperan SEA Diplomon, bonvolu kontakti s-ron Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, Florida Glen 1710 ĝustatempe.



MILITOBrida MAŜINO:

La tago poste, ĉu evitebla?

Amri Wandel, Usono

Kiel aspektos nia vivo post nuklea atako? Tiu demando provi respondi la ŝoka filmo *The Day After* (La tago poste), elsendita de la usona televida reto ABC fine de novembro, alirante rekordan nombron de pli ol cent milionoj da spektantoj.

La tago poste estas la historio de usona urbeto en Kansaso, kiu travivas nuklean bombadon. Sekvante la kortuŝajn travivaĵojn de individuoj tra la nuklea infero, oni spektas ŝokajn scenojn de homoj vaporigitaj en la eksploda fajroŝtormo, viktimojn de radiadobruoj kaj la hororajn efikojn de la radioaktiveco, kiu venas la aeron kaj la grundon longan tempon post la eksplodo. Kvankam pli surpraje, la filmo tuŝis ankaŭ la efikojn de la katastrofo sur la socia konstruo, kiel oni frontas la amason da vunditoj kaj la mankon de nutraĵoj.

Post la filmo, kies produktado kostis sep milionojn da dolaroj, grupo da specialistoj analizis la politikajn, sciencajn kaj humanismajn aspektojn de la nuklea minaco. Inter la specialistoj estis la antaŭa kaj nuna ministroj pri eksteraj aferoj de Usono, Henry Kissinger kaj George Schulz, la konata sciencisto Carl Sagan kaj la holo-kauŝta verkisto Eli Visel.

Unu el la plej evidentaj demandoj prezentita al la specialistoj estis "Ĉu tia sursceniĝo estas realisma, kaj ĉu ĝi vere povas okazi?" D-ro Sagan emfazis ke la filmo sublaksis la rezultojn de grandskala nuklea milito: se la sumo de nukleaj eksplodoj superos certan potencon, taksitan de sciencistoj je malmultaj miloj da megatunoj, la rezulto povas esti likvido de homa vivo sur la tuta terĝlobo. (La potenco de nuklea bombo estas mezurata per la ekvivalenta kvanto de ordinara eksplodaĵo (TNT). La potenco de la Hiroŝima-bombo estis 20 000 tunoj, dum hodiaŭaj hidrogenaj bomboj atingas potencon de pluraj megatunoj - milionoj da tunoj TNT.) La kialo por tio estas la giganta kvanto de polvo jetota en la atmosferon, kiu restos

ŝvebanta dum monatoj kaj eble jaroj, blokante la sunradiaĵon kaj kaŭzante "nuklean vintron" - ŝanĝon en la klimato kiu povas kaŭzi novan glaciepokon. Dum monatoj kaj jaroj la pluvo kaj la grundo estos tiom radioaktivaj ke pluvoj ne povos kreski.

La arsenalo de ĉiu el la du superpotencoj estas taksata je 20 000 ŝarĝokapoj, multo pli ol la sojla potenco por kaŭzi nuklean vintron. D-ro Sagan argumentis, ke estas do nepropra reciproke limigi la nuklean arsenalon sub tiu danĝera sojlo. Schulz konstatis ke lia postulo estas nerealisma, konsiderante ke dum jardekoj oni penas; preskaŭ senrezulte, limigi la vetarmadon. Laŭ li estos granda atingo se dum dek jaroj oni sukcesos interkonsenti pri duonigo de la nombro de ŝarĝokapoj.

Sed kiom utilos eĉ duonigo de potenco kiu estas multoble pli ol sufiĉa por detruiri la vivon sur nia planedo? Eĉ se oni kredas el la rezono kaj respondeco de la gvidantoj de Usono kaj Sovetio, kiu povas garanti ke nuklea milito ne startos pro Ireneza generalo, kiel en la filmo *Dr Strangelove*, sen eblo ĝin haltigi? Cetere, en la hodiaŭa plurpolusa nuklea mondo, pli kaj pli da ŝtatoj akiras nuklean kapablon. Nuklea el-lasilo en la manoj de senbrida ŝtatestro aŭ terorgrupo povas gvidi al plenskala nuklea milito.

Eli Visel konsideris la humanisman aspekton de la temo. La minaco estas tiom terura, ke oni apenaŭ povas racie analizi ĝin. Nenion oni taksu laŭ: "tio neniam okazos". La juda popolo jam spertis terurajn kiujn oni siatempe taksis ne-ebloj - ili tamen okazis. Ni devas ĉion memori: tion kio okazis, kaj tion kio povas okazi. Eble la daŭra konscio ke tiuj teruroj povas efektive realigi, estas la plej efika protekto.

Tamen, laŭ mi la plej grava aspekto ne estas la politika. Temas pri la pluekzisto de la homa civilizacio. Siatempo oni demandis al Einstein kiajn armilojn oni uzos en la estonta milito. "Mi ne scias kion oni uzos en la venonta milito", respondis Einstein, "sed la postan milionon oni balalos per ŝtonoj kaj bastonoj". Se konsideri la hodiaŭ ekzistantan detrupotencialon eble eĉ tio estas tro optimisma respondo... La unuan loĝon dum sia ekzisto, la homa speco posedas la povon detruiri sin mem. Kiom longe povas daŭri la malstabila ekvilibro de hororo kiu detenas nuklean militon? Estas malverŝajne ke la nuna situacio plu-daŭros dum longa tempo. La demando estas ĉu rezono venkos antaŭ ol estos tro malfrue, ĉu la homo scipovos senarmigi antaŭ ol sin detruiri.

Efektive ni frontas dunivelan minacon. La unua estas limigita nuklea kolizio, kiu ja kaŭzos hiroŝimecajn katastrofojn, sed la homaro kiel tuto pluvivos. La dua nivelo, kiu verŝajne ne estas perceptebla de nia plimulto, estas senbrida liberigo de la nuklea potenco, plenskala milito, kiu kaŭzos nuklean vintron, detruos la homan civilizacion kaj eble interrompos la ekziston de la homa speco. Tute ne estas certe, ĉu la unua nivelo povas esti apartigita de la dua, tio estas, ĉu limigita nuklea milito povas esti haltigita (kiel okazis en *La tago poste*) antaŭ ol eskali al kompleta pereco.

La politikistoj atestas ke ne estas realisme esperi ke dum la videbla estonteco oni reduktos la nuklean arsenalon sub la sojlo de danĝero. Restas do, laŭ mi, nur unu realisma solvo: apartigi la du nivelojn de la minaco. Certigi ke limigita nuklea kolizio neniel povos eskaladi en totalan sendetruan militon. Oni ekzemple povas interkonsenti pri teknikaj instalaĵoj kaj politikaj komunikaj sistemoj kiuj limigos la tuje uzeblan forton al dek centonoj de la tuta arsenalo de la superpotencoj. Ankaŭ tio ja sufiĉas por travivi kaj respondi surprizatakon kaj fortimigi potencialan atakanton. La restantaj 90% de la armiloj estos funkcigeblaj nur post certa tempo (kiel horloĝokontrolataj monŝrankoj en bankoj), tempobreĉo sufiĉe longa por certigi neeviteblan ŝtupon, de kiu eskalanta milito paŭzos. Tia paŭzo ebligos al la kontrola mekanismo, ĉu politika ĉu arma, vekigi kaj konstati ke oni troviĝas ĉe la rando de la abismo, de vojo sen eliro, ke apliko de pluaĵarmoj gvidos al la transiro de la sojlo kaj al propra detruo, same kiel detruo de la malamiko.

LA VIVO SEN AMO NE ESTAS....

Devo sen amo kaúzas.....malkontenton
 Respondeco sen amo kaúzas...senkonsideron
 Justeco sen amo kaúzas.....koron elŝtonan
 Vero sen amo kaúzas.....kritikon
 Edukado sen amo kaúzas.....kontraúulon
 Lerteco sen amo kaúzas.....ruzon
 Afableco sen amo kaúzas.....hipokriton
 Ordo sen amo kaúzas.....malgrandanimecon
 Kakkono sen amo kaúzas.....pravtenemon
 Povo sen amo kaúzas.....perforton
 Honoro sen amo kaúzas.....trofieron
 Posedaĵo sen amo kaúzas.....avaron
 Kredo sen amo kaúzas.....fanatikon

Tradukis el la germana Axel von Blottnitz

ESPERANTO EN DOKTORIĜA DISERTACIO

Dum januaro 1984 doktoriĝis Hartmut Sörgel per disertacio kun la temo *Sistemo de germanaj verboj en la elektronika, datumprilabora sfero kiel bazo por la lingvistika datumprilaborado, kompare kun la anglaj kaj Esperantaj verboj.* La 133-paĝa disertacio estas akceptita de Humboldt Univerŝitato en Berlino. En sia tezo d-ro Sörgel ankaŭ mencias Esperanto-fakterminojn el la menciita fako kaj elstarigas ties klarajn (sin memdifinantajn) strukturojn.

KELKAJ STATISTIKOJ PRI FUMADO

Espereble ĉiu homo en nia tempo scias, ke fumado malutilas al la sano. Tamen granda nombro da homoj en ĉiuj landoj sur la tero fumas. Kiuj estas la kialoj de ĉi tio? Kial fumantoj ne ĉesas fumi? Tiujn ĉi demandojn respondas sveda statistika esploro. Eble la respondoj ne validas por ĉiuj landoj, sed ili tamen povas esti interesaj!

KialoCentonoj de la demanditaro, kiuj opinias, ke la kialo validas

	Ĉiam	Ofte	Malofte	Neniam
<i>Bongustas/Estas agrable</i>	17	70	11	3
<i>Por vigliĝi/Por ne ekdormi</i>	3	11	31	55
<i>Por trankviliĝi</i>	8	46	27	19
<i>Aŭtomate fumas</i>	13	40	24	23
<i>Ĝuas fingrumi la cigaredon</i>	3	10	20	67
<i>Fumas kun amikoj</i>	35	57	5	3
<i>Fumas pro deprimado aŭ malkontento</i>	18	35	28	19
<i>Sentas intensan emon fumi kiam oni ne fumis dum tempeto</i>	16	39	30	15
<i>Kiam oni devas koncentriĝi pri iu problemo</i>	19	32	25	24


El Kontakto

EL NIA POEZIO**MI VIDIS ŜIPON**

Mi vidis ŝipon en la last haven,
 Sur koto, kie ŝip-kadavro putros,
 Sen mast' aŭ ŝnur; de l' ripoj ŝlimo gutos,
 Kaj ruĝa lepro rampos sur karen;
 Kaj ĉian belon de l' fier maten
 La tempo kaj forgeso homa glutos;
 Aĥ! ke mi, kiam morto min salutos,
 Ne mortu tiel, sed en vivoplen!

Mi volus morti, kiel ŝip, batale
 En uragan, sub ŝaŭm vipanta ŝtale;
 Aŭ perdi min en blinda blank aero;
 Aŭ sorton ĉe sudmara rif inviti,
 Kaj en stelplena nokto de somero,
 Dum mar apenaŭ spiras, funden gliti.

-L.N.M. Newell



PENSETOJ EL L'VIVO

- : Feliĉa homo estas kiel parfumo. Oni ne povas ĵeti ĝin sur aliulojn sen mem odori je ĝi.
- : Vera amo estas maloftaĵo; vera amikeco eĉ pli granda maloftaĵo.
- : Se homoj parolas malbone pri vi, vivu tiel, ke la aŭdantoj de tiuj fiparoloj ilin ne kredas.
- : Reputacio estas tio, kion homoj opinias pri vi; karaktero estas, kion Dio scias pri vi.
- : Ne timu, ke homoj ne vidas viajn bonajn kvalitojn; timu ke vi ilin eble ne havas.



KIO PRI LA DISVASTIGO INTER SUDAFRIKAJ NIGRULOJ?

Estimata Redaktoro

Mi legis en via revuo pri la entrepreno *Sudafriko Helpas Afrikon*. La anonco pensigis min pri Afriko, SEA kaj Esperanto. Permesu al mi kelkajn vortojn....

En la statuto de UEA mi legis: "...por aligi al UEA la kondiĉoj por landa Esperanto-asocio estas....ke ĝi estas asocio....vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro....."

raso....kaj ke ĝi....respektas la....celojn de UEA". Inter la celoj de UEA mi trovas:"....plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de....raso; kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj homoj."

SEA, estante landa asocio aliĝinta al UEA, tial devas respekti ties celojn. Tamen, antaŭ ol helpi ekstersudafrikajn nigrulajn Esperantistojn, ĝi helpu siajn proprajn nigrulojn por fariĝi Esperantistoj. La tutafrikigo pri Esperanto estas bona ideo, sed memoru, ke Sudafriko estas parto de Afriko. Antaŭ ol *Sudafriko Helpas Afrikon* necesas, ke Sudafriko helpu sin mem. Kaj ĉu ĝi tion povas fari?

Al unuopuloj estas malfacile realigi tiun devon pro la sistemo malpermesa kaj subprema, trudata al ni de rasisma reĝimo. Por prezenti Esperanton al nigraj sudafrikanoj necesas celkonscienca provo plenumata. La akcepto pri Esperanto de nigraj sudafrikanoj estos la sola garantio por la praktika postvivo de nia lingvo en nia lando. Do, nun pli ol iam antaŭe, ni devas flankenpuŝi kaj eviti nian tekonventipan pensmanieron pri Esperanto!

Kia la ligo de SEA kun aliaj afrikaj E-movadoj? Ĝi estu egalforta kiel kun tiuj de la eŭropaj, se ne pli forta. Kaj por plenumigi tiun ideon, SEA devas malproksimigi sin de ia ajn rasismo, ne nur teorie sed ankaŭ aparte praktike: la nenatura kastosistemo postulas nin aktive klopodi kontraŭstari tion. Nura deklaro, ke Sudafriko estas vaste pli permesa kaj malfermita ne sufiĉas. La kastosistemo estas fremdega al la koro kaj spirito de la Interlingvo kaj la neŭtraleco de Esperanto ne signifas apation.

Pro ĉiuj kialoj praktikaj, SEA estas blankula organizaĵo. Kiel ni disvastigos la uzadon de Esperanto sen ŝajni imperialistaj? Jen mia propono: Ke ni prezentu nian lingvon en pornigrulaj gazetoj, ĵurnaloj, lernejoj, universitatoj kaj aliaj similaj postabiturientaj edukaj institutoj. Bezonas kontakto kun aliaj afrikaj Esperantistoj. Individua kontakto estas grava ilo por tiaj agadoj. Kaj, ni ne forgesu pri niaj propraj nigraj sudafrikanoj! Aparte grava estas kontakto inter sudafrikaj nigruloj kaj aliaj afrikanoj. Kvankam la


jubilea festo pri Esperanto okazos nur en 1987, ni jam pri-
pensu, ke tiu grava okazo donos al ni bonan ŝancon fari
multon ĉi-rilate. La 1986-a jaro estos la Internacia Jaro
por Paco. En la instruado de Esperanto en Sudafriko oni
uzu la specialan 'kompleton' pri paco aperigota far UEA.

Mi konkludas per tio, ke Esperanto en nia lando ne dum eĉ
unu komento pli longe restu afero nur por la specialaj
elektitoj. Ni kunlaboru kaj senprokraste realigu idealan
situation, ĉiu per individua ekzemplo kaj memagado. Tio ĉi
estu la minimumo, kiun ni faru. Estante studento ne kun
bona salajro, mi ekzempligas per R10 kiun SEA uzu por la
disvastigo de Esperanto inter niaj propraj nigruoj.

Sincere via
(Subskribinto:Hannes van Loggerenberg, Cassiarylaan 69,
Sunridgepark, Port Elizabeth 6001)

VENTERAĴOJ

En la sudafrika industria urĝego Uitenhage loĝas emeritulo,
kiu dum pli ol 33 jaroj jam eksperimentas pri la kukurb-
aspekta subtropa frukto, la papajo kaj per siaj eksperimentoj atingis
interesajn rezultojn. Interalie, liaj arboj pli frue ol kutime komen-
cas produkti fruktojn. Ĉe li ne estas eksterordinare, ke arbeto
nur unu metron alta jam surhavas unu-du fruktojn. Ankaŭ interese,
estas, ke tiuj arboj - kiuj ordinarne ne kapablas toleri malvarmon - jam sukcesis trans-
vivi froston kaj malvarmegon. La arboj de s-ro Weiss jam tutsukcese kreskas ĉe Oudtshoorn kaj Graaff Reinet, kie
oni spertas mortigajn froston kaj prujnon.



El *Landbouweekblad*, tradukita de E S Venter

EL LA SCIENCO

Ĉu vi scias, ke.....

* Viroj havas pli grandan cerbon ol
virinoj, rilate al volumeno? La
kapo de viro estas pli granda ol
virino, kaj sekve la cerbo estas pli
ankaŭpli peza!

* Mondvasta esploro

pruvigis, ke la
plimulto de
argumentoj
okazas en la
monato julio.

* Homo uzas
13 muskolojn por
rideti kaj 50 por sulki la

* Se perdiĝus 1% de la akvo en
li soifus; se 10% li fariĝus
se 20% li mortus.

* Nia sango travojaĝas 265 000 000 kilometrojn dum ĉiu tago.

* Cerro de Pasco en Peruo estas la plej alta urbeto en la
mondo. Ĝi situas en la Andes montaro.


* Reĝo George I estis angla reĝo kiu ne scipovis la anglan
lingvon. Li ankaŭ ne scipovis Esperanton.....

La vaganta albatroso estas la plej granda flugpova birdo.

.....

PRESERARO?

Neniu pano estas tro peza por enkarcerulo..... (puno)



Ĉe la artgalerio

Ŝi: Devas esti viro. La
kapo estas tro granda.

Li: Tute ne, karulino.
Vidu la truon en la
kapo. Vidu la
truon!

tiu de
granda kaj

brovoj.

homa korpo.
senkonscia;



« LA KUNIKLOJ DE MIA AVO »

de la eldonserio « Plejado » enhavas 13 kolorbildejn

« LA KUNIKLOJ DE MIA AVO » de Giovanna Sarandrea kun antaŭparolo de Carlo Sarandrea. El la itala tradukis Lina Gabrielli. Fabelserio « Plejado ». Prezo 15.000 italajn lirojn. Por mendinto de pli ol 5 ekz. rabato 20% kaj donaco de sendkosto.

Giovanna Sarandrea rakontas signifoplenan historieton, kiu okazis kiam ŝi estis en infana aĝo, en sia vilaĝo. Tiu historieto estas ne nur vera kaj sincera, tenera kaj gracia, sed ankaŭ instruoplena, ĉar ĝi montras kiel reagi kiam doloro vigligas kaj soleco premas. Avo Gaspacio, simpla kaj koroplana maljunulo, estas ekzemplo, kiun la aŭtorino donacas al ni danke al la konvinko ke la feliĉo ekzistas se ni dediĉas nin al la aliaj kun vera amo.

Eldonisto de la « PLEJADO »

(Giovanna)

Via Sistina, 20


I. 00187

ROMA

(Italujo)

Andrew DiLernia, 2771 E. 15th Street, Brooklyn, NY 11235, USA deziras korespondi kun Esperantistoj kiuj ankaŭ scipovas la afrikansan lingvon.

L'inkpoto



Leokadia Fischer, ul. Bulgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando estas 29-jara polino kaj ŝi deziras korespondi pri Esperanto. Ŝi ankaŭ volas interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn, monerojn kaj Esperanto-librojn.

Jerry Veit, 32 Barnum Street, Taunton, MA 02780, Usono estas 29-jara tradukisto lernante la afrikansan lingvon. Li deziras interŝanĝi anglalingvajn poŝlibrojn kontraŭ afrikansaj. La malfacilo akiri afrikansajn librojn en Usono serioze malhelpas lian studadon de la afrikansa. Li bone regas Esoeranton.

Jean-Marie Geron, rue Valentin Nisol 8, 7370 Elouges, Belgio intencas instrui Esperanton. Jean-Marie volas konatigi siajn gelernantojn al sudafrikaj Esperantistoj.

Wojciech Milewski, 88-140 Gniewkowo, SKR. POCZT. 13, Pollando estas fervoja Esperantisto kaj deziras korespondi kaj pri kaj per Esperanto. Lin ankaŭ interesas libroj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insigmoj, moneroj k.a.

M J Denisov, Pionerskij 2-18, Novgorodskij, 174 000 Rogavka, USSR estas 44-jara inĝeniero kiu loĝas apud Leningrado. Se vi interesiĝas pri metaloj, moneroj aŭ io ajn alia, skribu al li ĉe la ĉi-supra adreso. Liaj klopodoj kontakti sudafrikan Esperantiston kondukis lin al Nigerio de kie li akiris la adreson de SEA. Nepre korespondu kun Miĥail, kiu promesas interesajn leterojn!

ANONCOJ

* La elementa kaj mezgrada ekzamenoj de SEA. Kontakto Axel von Blottnitz ĉe Marcolaan 8, Florida Glen 1710 por aranĝi via(j)n ekzameno(j)n.

* Ĝoje ni anoncas al vi la fondiĝon en Portugalio de *Kooperativo de Geesperantistoj kaj Geamikoj de Esperanto kaj de la Naturo, por Kulturo kaj Libertempoj*. Ĝi estas alloga al kunvivado, samtempe internacia kaj familia dum la tuta jaro. Aliĝu sendante ĉ. 12 usonajn dolarojn kaj tiumaniere subtenu nian novnaskitan kooperativon! Cooperativa SALUTON!, Rua do Miradouro 12, T.924 0606, 2735 Cacém, Portugal.



* Okaze de la centjara datreveno de Esperanto, *Veterana Esperantista Klubo* intencas eldoni memorlibron pri sia movado kaj ĉefaj pioniroj/propagandistoj. Informo pri la evoluo de Esperanto en via regiono ankaŭ bonvenas. Respondu al R. Melo, 34 Avenue de Russie, F.03700 Bellerive sur Allier, France.


* La Redakcio de *Bona Espero* jam planas memorlibron eldonotan en 1987, okaze de la jubilea festo de la Interlingvo. Kelkaj sudafrikaj Esperantistoj ensendis informon sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. Bonvolu senprokraste ensendi ian ajn informon kian vi disponas. Se ankaŭ vi volas disvastigi Esperanton en Sudafriko, tuj agu! Ne atendu ĝis 1986/7. La Redakcio urĝe bezonas la necesan informon kiel eble plej baldaŭ!!! Via informo estu pri Esperantaĵoj en Sudafriko.

* Lastmomente: la nombro da studentoj kiuj registris sin por la nova teknikona kurso pri Esperanto estas, je la 4-a de septembro, 21. Inter ili estas la rektoro de la teknikono (profesoro D Veldsman), la ĉefo de la teknikona lingva fako (advokato N Wood), kaj la ĉefo de la Staff Development Bureau (doktoro Potgieter). Vidu ankaŭ sur p. 3.


* Faldfolio pri Esperanto estas nun havebla en diversaj lingvoj inter aliaj ankaŭ la afrikansa kaj la angla. Mendu de la Sekretario de SEA, Bronkhorststraat 75, Groenkloof 0181

Verstehen durch ESPERANTO die Interethnische Sprache	আ-জর্জটিক ডাগা এশ্পেরান্টো বাইভা-পড়ার পাঠ্য	DOROZUMĖNI ESPERANTEM MEZINAROONIM JAZYKEM
	Cu via lingvo mankas ĉi tie ?	
Verstandhouding door middel van ESPERANTO de Interethnische taal	Sporazumevanje z ESPERANTO-m, međnarodnim jezikom	Intelegere priin ESPERANTO lingva interetnică
РАЗУМПЕАЧЕСТВО ЧРЕЗ МЕЖДУНАРОДНИЈ ЕЗИК ЕСПЕРАНТО	Interkompreno per ESPERANTO la interetna lingvo	Saling mengerti dengan mentakai bahasa Esperanto bahasa antarabangsa
Se comprendre grâce à l'ESPERANTO la langue inter-ethnique		Understanding through ESPERANTO the inter-ethnic language
Wederzijdse begrip deur ESPERANTO die interetniese taal	Informu per faldfolio havebla en 26 lingvoj de esperanto press Baillieboro, Ontario, Kanado, KOL 1B0	인류공통어 에스페란토를 통한 상호이해
تفاهم به وسیله اسپیرانتو زبان بین ملی		БЕРАЗОУМНЕННЕ С ПАМ'ЯМ МЕЖДУНАРОДНОГО ЕЗІКА ЭСПЕРАНТО
Saprašāns starptautiskajā valodā esperanto		Megerti egymást az esperantó közvetítés inter-ethnikus nemzetközi nyelv révén
Dorozumenie pomocou međnarodnelo jazyka ESPERANTO	Forståelse med ESPERANTO det interetniske sproget	Compreensão pelo ESPERANTO a lingua inter-étnica
Porozumienie z pomocą ESPERANTO języka międzynarodowego	Suhtlemine rahvusvahelise keele ESPERANTO abil	Förståelse genom ESPERANTO det inter-etniska språket
Comprendersi con l'Esperanto la lingua interetnica	Անդառնություններով մեզ ԵՍՔԵՐԱՆՏՈ յեզիկով համար	Uluslararası dil ESPERANTO ile anlaşma





Eĉ la plej forta ĉeno
estas nur tiel forta
kiel la plej malfora
ĉenero. La Redakcio
bezonas ankaŭ vian
kunlaboron. Bonvolu
ensendi kontribuaĵojn
por Bona Espero kaj
la Jubilea Memolibro



SEA



ISSN 0006-7024